

# LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la  
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)  
Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.  
Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato  
Jarkolekto 4, n-ro 2 (20): julio-aŭgusto 2011  
Antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas  
ekde de la numero 13 (majo-junio 2010).  
Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,  
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47  
Retadreso: [pieter-jan.doumen@telenet.be](mailto:pieter-jan.doumen@telenet.be)

## Redaktore...

*Karaj Legantoj,*

*Denove la periodo de la somerferioj komen-  
ciĝis, kaj ankaŭ la tradicia periodo de grandaj  
Esperantokongresoj.*

*Multaj esperantistoj kombinas siajn feriojn  
kun la Universala Kongreso, kiu fine de tiu ĉi  
monato okazos en Kopenhago (23-30 de julio).  
Sed estas multaj malpli grandaj aranĝoj, kie  
kunvenas esperantistoj el diversaj landoj. Iuj  
faras tion precipe por havi la okazon paroli aŭ  
lerni paroli Esperanton. Aliaj iras nur por  
enspiri kaj ĝui la specialan etoson de Espe-  
ranto-aranĝo, amikiĝi kun alilandaj partop-  
renantoj aŭ renkonti alilandajn amikojn.*

*Certe ankaŭ la speciala karaktero de niaj  
aranĝoj altiras la esperantistojn, nome la fakto  
ke la partoprenantoj sentas sin kvazaŭ mem-  
brojn de unu sama nacio. La lingvo kiel speco  
de identeco ligas diversnaciajn gesamidea-  
nojn, forigante la lingvobarojn inter ili .*

*Se vi ankoraŭ ne spertis tion, faru la provon.  
Iel ajn, nome de la estraro de LEA mi deziras  
al vi ripozigajn feriojn enlande aŭ eksterlande  
kaj agrablan legadon!*

*Pieter Jan Doumen*

## Dua Libro de l' Lingvo Internacia(1)

*(Tweede Boek van de Internationale Taal) (1)*

*D-ro Zamenhof verkis la Unuan Libron, kiel  
sciate, en la rusa. La Duan Libron li skribis en  
Esperanto en 1888, do unu jaron poste, por la  
multaj entuziasmaj homoj kiuj komencis lerni  
lian lingvon. En lia teksto mi anstataŭigis la  
tempajn adverbojn "ian, kian, tian, ĉian,  
nenian" per "iam, kiam, tiam, ĉiam, neniam.  
Tiujn formojn li mem poste ekuzis por distingi  
ilin de la akuzativo de la adjektivaj pronomoj  
"ia, kia, tia, ĉia, nenia".*

*Li skribis tiun ĉi verkon en Esperanto por  
doni al siaj adeptoj ekzemplojn de tio, kiel*

*funkcias lia lingvo en la praktiko. Oni povas  
konstati, ke en preskaŭ 125 jaroj la lingvo  
malmulte ŝanĝiĝis! (P.J.D.)*

Elirante ankoraŭ unu fojon antaŭ la estimata publiko, mi sentas la devon antaŭ ĉio danki la legantan publikon por la viva kunsento, kiun ĝi montris por mia afero. La multaj promesoj, kiujn mi ricevis, kaj el kiuj tre granda parto estas subskribita "senkondiĉe", la leteroj kun kuraĝigoj aŭ konsiloj – ĉio tio ĉi montras al mi, ke mia profunda kredo je l' homaro min ne trompis. La bona genio de l' homaro vekigis: de ĉiuj flankoj al la laboro ĉiuhoma venas amasoj, kiuj ordinare estas tiel maldiligentaj por ĉia nova afero; junaj kaj maljunaj, viroj kaj virinoj – rapidas porti ilian ŝtonon por la granda, grava kaj utilega konstruo. Vivu l' homaro, vivu la frateco de l' popoloj, vivu eterne!




La lasta foto de D-ro Zamenhof (1917)

En mia unua verko mi diris, ke mian laboron mi prezentas je l' tempo de unu jaro al la juĝo de l' tuta mondo; kiam pasus la jaro, mi intencis eldoni libreton, en kiu estus analizita ĉiuj pensoj esprimitaj de l' publiko, kaj uzinte tiujn, kiuj efektive estus bonaj, mi donus al la lingvo la finan formon, kaj post tio ĉi oni jam povus komenci la eldonon de plenaj vortaroj, libroj, gazetoj kaj cetere, ĉar tiam la lingvo jam estus trairinta la juĝon de l' tuta mondo, kaj ĉiu plej gravaj malbonaĵoj, kiuj povus esti trovitaj en ĝi, ĉar en verko de 'unu' homo, estus jam pli

aŭ malpli forigitaj. Mi efektive intencis silenti en la daŭro de tuta jaro. Sed de l' tago, kiam eliris mia libreto, mi komencis ricevi multon da leteroj kun demandoj kaj kun petoj rapidigi l' aferon. Respondi je ĉiu letero aparte estas por mi ne eble, kaj tial mi decidis respondi publike je ĉiuj demandoj kaj proponoj, ĉar tiel unu respondo povas servi por multaj demandantoj. Ĉiuj respondoj faros unu libron, kiu prezentos daŭrigon de l' unua libro, kiun mi eldonis. Sed se mi volus la respondojn je ĉiuj demandoj eldoni kune, en unu libro, mi devus tro longe atendigi miajn korespondantojn, dum<sup>1</sup> tiu libro estos preta kaj eldonita, tiom pli, ke konstante al mi venas novaj demandoj; tial mi decidis eldoni la libron kun la respondoj per apartaj kajeroj, kiuj estos ellasataj en la daŭro de la tuta jaro 1888 periode, kun intertempoj de ĉirkaŭ du monatoj de unu kajero ĝis la venonta. En tiuj ĉi kajeroj 'ĉiuj' demandoj estos responditaj; je l' fino de la jaro 1888 eliros la lasta kajero, kaj la 'Dua Libro de l' Lingvo Internacia' estos finita.

Ankoraŭ unu afero devigas min komenci la eldonon de l' kajeroj, pri kiuj mi parolis: malgraŭ l' intenco, kiun mi esprimis en mia unua verko, komenci la eldonon de libroj ne pli frue, ol estos finita la juĝo de l' publiko je l' lingvo proponita de mi, de ĉiuj flankoj venas postuloj, ke mi kiom eble pli<sup>2</sup> rapide eldonu ian libron en la lingvo internacia, ke<sup>3</sup> la publiko povu koniĝi kun tiu ĉi lingvo ĉiuflanke. La nombro de tiuj ĉi postuloj estas tiel granda, ke mi ne povas ja aŭdi ilin silente. Eldonante la 'Duan Libron de l' Lingvo Internacia', skribitan jam en tiu ĉi lingvo, mi donos al la dezirantoj sufiĉe da materialo por legi kaj la eblon tute bone ellerni la lingvon; esceptinte la tekston de l' libro, kiu jam per si mem prezentos materialon por legi, en la libro estos ankaŭ pecoj sistemaj, por lerni kaj ripeti.

La tuta libro havos 5-6 kajerojn, en kiuj estos trovataj respondoj je 'ĉiuj' demandoj, kiuj tuŝas la lingvon mem, ĝian konstruon, ĝian estontecon, kiel ĝin bone kaj fonde ellerni, kaj plej rapide kaj plej certe vastigi ĝian uzon en la mondo, kaj cetere. Kiam la lasta kajero de l' libro estos elirinta, tiam por la leganto nenio jam estos neklara: la societo<sup>4</sup> tiam konos la tutan animon de l' lingvo, ĝi tiam havos 'ple-



nan' vortaron kaj povus tute 'libere' uzi la lingvon por 'ĉiaj celoj', kiel ĝi povas nun uzi ĉian riĉan kaj prilaboritan vivantan lingvon. La dependo de la lingvo de l' volo aŭ de l' talento de mia propra persono aŭ de ia alia aparta persono aŭ personaro tute foriĝos. La lingvo tiam estos tute preta en ĉiuj plej grandaj ĝiaj partoj. La persono de l' aŭtoro tiam tute foriros de la sceno<sup>5</sup> kaj estos forgesita. Ĉu mi post tio ankoraŭ vivos, ĉu mi mortos, ĉu mi ĝin perdos, l' afero tute ne dependos de tio, kiel la sorto de ia vivanta lingvo tute ne dependas de l' sorto de tiu ĉi aŭ tiu persono.

Multaj kredeble balancas senkrede la kapon, legante miajn vortojn. Kiel tio estas ebla, ili diras, ke en la tempo de unu jaro la lingvo estus tute kaj plene preta, ke ĝi ne bezonus pli<sup>6</sup> la laboron de l' aŭtoro? Ke tiel grandega afero, kiel la kreo kaj la enkonduko de lingvo tutmonda, en la tempo de unu jaro tiel maturiĝus kaj fortiĝus kaj ricevus tian klaran neŝanceleblan ordon, ke ĝi ne bezonus pli<sup>6</sup> kondukanon! Sed mi esperas, ke jam post la dua aŭ tria kajero la leganto vidos, ke mi ne fantazias.

La leganto ne pensu, ke en la libro, kiun mi intencas eldoni, li vidos iajn mirindaĵojn. Tiu, kiu kutimis estimi la aferojn ne laŭ ilia praktika signifo kaj efektiva indo, sed laŭ la mirindeco kaj nenatureco de ilia nasko, estos kredeble trompita en siaj esperoj, kiam, legante mian libron, li renkontos en ĝi sole aferojn simplajn kaj naturajn. Sed la rezultatoj de tiuj ĉi simplaĵoj estos, kiel laŭ mia espero la leganto poste vidos kaj konfesos, ke post la fino de l' jaro

<sup>1</sup> Rusismo por 'ĝis'.

<sup>2</sup> Rusismo por 'plej'.

<sup>3</sup> Rusismo por 'por ke'.

<sup>4</sup> Nuntempe: 'la socio'.


<sup>5</sup> Nuntempe: 'scenejo'.

<sup>6</sup> Nuntempe: 'plu'.

- la lingvo estos finita kaj preta tute kaj plene, tiom ke ĝi tute ne bezonos pli<sup>6</sup> la laboron de l' aŭtoro, kaj, kiel ĉiu el la vivantaj lingvoj, ĝi fariĝos tute sendependa de ia aparta persono; - la lingvo estos pli aŭ malpli 'senerara', ĉar ĝis tiu tempo ĝi jam estos trairinta la juĝon de l' tuta mondo, kaj ĉiuj malbonaĵoj, kiuj povus esti trovitaj en tiu ĉi laboro de 'unu persono', estos forigitaj per la konsiloj de l' tuta mondo kune. (Daŭrigota) (D-ro L.L.Zamenhof)

### **Aŭtenta letero pri Jesuo Kristo** (*Authentieke brief over Jezus Christus*)

Nelonge antaŭ la eksplodo de la Unua Mondmilito (1914-1918) oni malkovris en la biblioteko de la Lazaristoj, katolikoj monaĥoj, en Svislando, antikvan dokumenton, kiu ege gravas por la historio de la kristanaj religioj. Temas pri letero, kiun Publio Kornelio Lentulo, la sukcedinto de Poncio Pilato, sendis al la romia imperiestro Tiberio. En tiu ĉi latine skribita letero temas pri Jesuo Kristo. En Esperanto ĝi tekstas jene:



Jesuo Kristo

*Publio Lentulo, al la imperiestro<sup>7</sup> de Romio: saluton!*

<sup>7</sup> Tiberio Klaŭdio Nerono, imperiestro de Romio de 14 ĝis 37 p.K., naskiĝinta en 42 a.K.

*Mi aŭdis, Cezaro, ke vi deziras ekscii ion pri la virta viro, kiu nomiĝas Jesuo Kristo, kaj kiun la popolo konsideras kiel profeton, kiel dion, kaj kies disĉiploj diras pri li, ke li estas la filo de Dio, la Kreinto de la ĉielo kaj la tero.*

*Efektive, ho Cezaro, oni aŭdas ĉiutage mirigajn aferojn pri tiu viro. Koncize dirite: li revivigas mortulojn kaj kuracis malsanulojn.*

*Li estas viro de mezuma staturado, de bela aspekta kaj de granda digneco, kion ankaŭ elradias la noblaj trajtoj de lia vizaĝo, tiel ke, se oni rigardas la viron, oni tuj ekhavas la senton devi samtempe ŝati kaj timi lin. Ĝis la supra rando de liaj oreloj liaj haroj havas la koloron de maturaj juglandoj; de tie ĝis la ŝultroj ili brilas helblonde. En la mezo li havas hardislimon laŭ la kutimo de la nazarenoj. Lia frunto estas glata, lia vizaĝo estas sen faldoj kaj makuloj. Lia barbo havas la saman koloron kiel liaj kapharoj, estas bukla kaj, kvankam ne longa, estas dividita en la mezo. Lia rigardo estas severa kaj havas la fortecon de sunradio. Neniu povas firme rigardi lin en la okulojn. Liaj manoj estas belaj, tute kiel liaj brakoj. Ĉiuj trovas liajn alparolojn agrablaj kaj interesaj. Oni malofte vidas lin en publiko, sed kiam li troviĝas ie, li agas tre modeste. Lia sinteno estas tre distingita. Li estas inteligenta. Kvankam li neniam studis, li konas ĉiujn sciencojn. Li iras nudpiede kaj nudkape. Multaj ridas pri li, kiam ili vidas lin de malproksime, sed tuj kiam ili troviĝas en lia proksimeco, ili samtempe timas kaj admiras lin. Oni diras en tiu ĉi lando, ke oni neniam vidis tian viron. La popolo asertas, ke oni neniam ĉeestis tian instruon, kia estas la lia. Multaj diras, ke li estas Dio; aliaj diras, ke li estus via malamiko, ho Cezaro. Tiu malica popolo turmentas lin diversmaniere. Oni tamen diras, ke li neniam malkontentigis iun, sed ke li plie ĉiam provas kontentigi ĉiujn.*

*Mi pretas, ho Cezaro, plenumi ĉiun ordonon, kiun vi donos al mi rilate al li.*

*Donita en Jeruzalemo, la sepan de la dek-unuan monaton.*

*Publio Lentulo*  
(N. Schneider, Svisio; trad. P.J.D.)

### **Nia vasta bunta mondo**

*(Onze wijde bonte wereld)*

#### **1. Tiu diableca citrono**

*(Die duivelse citroen)*

Tuj kiam la Sinjoro Dio kreis la oranĝon, la diablo kreis la citronon, almenaŭ laŭ la kataluna folkloro. Sed aliloke oni ne rakontas tiajn




malicajn supersticiajn rakontojn pri la flava citrofrukto, sed scias bone uzi ĝin. Efektive aperas, ke la uzo de la citrono en domo, ĝardeno kaj kuirejo estas multflanka.

Verŝu kelkajn gutojn da citronosuko en la bolakvon de rizo aŭ terpomoj kaj ili restas tute blankaj.

Se vi mem preparas kremglaciaĵon, aldonu kelkajn gutojn da citronosuko en la preparajon por eviti kristaliĝon.

Ĉu vi fritis fiŝojn, aŭ ĉu vin vizitis fuman-toj? Por malodorigi la domon, rostu kelkajn pecojn da citronŝelo sur bakpleto, fornelo, en la fajrejo aŭ forno.



*Citrus aurantium*: a) tigo kun folio kaj floro, b) floro (tranĉosurfaco), c) ovaria fundo, d) frukto, e) + f) semo.

Por maladikiĝi, verŝu vespere du tasojn da bolanta akvo sur du kamomiloburĝonojn kaj en pecojn tranĉitan citronon. Lasu infuzi ilin dum unu nokto, tiam filtru kaj trinku la tizanon kun malplena stomako.

Ĉu vi trovas formikojn en via provizoŝranko? Metu kelkajn malboniĝintajn ŝelppecojn sur la bretojn kaj ili malaperos.

Purigu vian vizaĝon dufoje semajne per citronosuko. Tiel vi evitos la formiĝon de sulketoj kaj klarigos vian vizaĝkoloron.

Por pliblanĝi viajn dentojn, purigu ilin unufoje semajne per citronosuko.

Se vin turmentas kapdoloro, metu sur viajn tempiojn po citrontranĉeton por mildigi ĝin.

En mallonga tempo vi purigos nigrajn ongojn kaj nikotinfingrojn frotante ilin per citronosuko.

Ĉu vi volas sendi sekretan leteron? Skribu ĝin per pura citronosuko. La adresito devas teni la leteron kelkajn momentojn super flamo aŭ alia lumfonto por povi malĉifri la leteron.

(El H.B.V.L.)

## 2. La bonfareco de la framboj (*De weldadigheid van de frambozen*)

La framboj, kiuj estas parencoj de la rubusoj, entenas elagitaninojn. Tiujn substancojn oni trovas ankaŭ malgrandkvante en fragoj, sed ankaŭ en certaj lignospecoj kaj en arboŝelo, do en nenia alia nutraĵo. La nomo tanino rilatas al 'tani'. Kvankam ankoraŭ ne oficiale konstatite, kiuj estas la efikoj de tiu substanco, ĝi kaŭzus pli bonan trasangadon. Tio gravas por la korpaj sangovaskuloj. Jam la romianoj sciis tion. Ili multe ŝatis, ke la virinoj regalu sin per tiuj fruktetoj, kiuj donis al ili ruĝajn vangojn. Plie framboj plibonigas seksumadon, ĉar la frukto plifortigas la libidon ĉe viro kaj virino.



Frambo (*rubus idaeus*)

Framboj entenas grandan kvanton da antioksidantoj, substancoj kiuj protektas nin kontraŭ la 'liberaj radikaloj' en niaj vejnoj kaj arterioj, kiuj kaŭzas kanceron kaj korafekciojn. La fruktoj entenas multajn fibrojn, la vitaminojn C, B2 kaj B6 kaj plie estas malriĉaj je kalorioj. Antaŭe oni faris teon de frambofolioj por uzi ĝin ĉe gravedeco kaj nasko. Ĝi estas bonefika por la utero, malpliigas la doloron dum nasko kaj limigas sangadon. La tizano ankaŭ multe helpus kontraŭ diareo, sanganta dentokarno kaj aftoj en la buŝo. Tizano de frambofloroj miksitaj per mielo estas bona kontraŭ okulinfektoj.

(El H.B.V.L.)

### 3. Koka-Kola ekzistas 125 jarojn! (Coca-Cola bestaat 125 jaar!)

Se oni verŝus la tutan kvanton da Koka-Kola kiun oni iam produktis, en botelotojn de 25 cl, oni havus 7,2 bilionojn da botelotoj. Tio estus 1.160 botelotoj por ĉiu persono sur la tero! Staplitaj unuj sur la aliajn la boteloj povus transporti 1.677 fojojn la distancon de la tero ĝis la luno kaj ree. 94% de la monda loĝantaro konus la markon, kiu estus la plej konata anglalingva esprimo post OK.


En 1886 apotekisto John Pemverton eltrovis rimedon kontraŭ kapdoloro. Lia librotenisto nomis la trinkaĵon Koka-Kola kaj dezajnis la tipajn pimpajn literojn sur la boteloj. La unuan jaron ili vendis ĉiutage naŭ glasojn. Hodiaŭ oni trinkas ĉiutage preskaŭ 20.000 botelotojn de la firmao Koka-Kola.



En 1892 iu Asa Candler akiris ĉiujn akciojn kaj establis la kompanion en la ŝtato Georgio. En 1915 iu Aleksandro Samuelson dezajnis la praformon de la konata ventrohava botelo, ĉar la kompanio deziris havi 'unikan pakumon'. En 1933 Koka-Kola instalas la unuan trinkaĵaŭtomaton sur la mondekspozicion en Ĉikago. En 1935 Lettie Pate Evans aliĝis al la direktorio. Ŝi estis la unua virino en la direktorio de granda kompanio. Ŝi restis ĝis 1953.

En 1947 la unua memstara enboteligejo en Eŭropo estas malfermita en Sint-Truiden (Sankt-Trudo), Limburgo, Belgio. En 1955 Koka-Kola lanĉis *Fanta Orange*, ['fente 'orinĝ] la unuan novan produkton de la kompanio. Nuntempe ĝi havas pli ol 500 diversajn markojn de trinkaĵoj, kiuj estas verŝataj en botelojn aŭ ladskatolojn en pli ol 1200 enboteligejoj en la tuta mondo.

En 1960 la kompanio transprenis *The Minute Maid Corporation* ['minit mejd korpo'rejŝen] kaj vendas ekde tiam ankaŭ fruktosukojn.



En 1984 Koka-Kola *Light* [lajt] estis enkondukita en Belgion. Fine, en 2005, aperis ideala trinkaĵo, nome Koka-Kola *Zero* [ziroŭ], kiu enhavas nul kaloriojn. (El H.B.V.L.)


### 4. La cunamo en Japanio (De tsunami in Japan)

Vendredo, 20.05.2011. Sekve de la forta cunamo, kiu okazis la 11-an de marto apud la japana orienta marbordo, la marfundo tie forŝoviĝis 24 m. Temas pri la plej granda forŝoviĝo iam registrita. Dum tiu tremo la sciencistoj unuafoje mezuris tian terforŝoviĝon centojn da metroj sub la akvosurfaco.

Jam dum kelkaj jaroj teamo de japanaj margardistoj observis plurajn lokojn laŭlonge de la japana rifto, kiu respondecis pro la tremo. La sciencistoj lokis transpondilojn sur la marfundon. Helpe de eĥosondilo ili povis registri ekde siaj ŝipoj la ĝustan lokon de tiuj aparatoj. La loko de la ŝipoj estis precize sekvata helpe de navigilaj satelitoj. Tio teĥniko estas necesa, ĉar la navigilaj signaloj ne povas atingi la marfundon. Nelonge post la martremo la sciencistoj reiris surloken por mezuri la ŝanĝiĝojn. Tiuj rektaj mezuradoj estas pli facilaj kaj ĝustaj ol mezuradoj ekde la marbordo. (Interreto)

### 5. Kreskanta truego sub Islando (Groeiend gat onder IJland)

La pejzaĝo estas neverŝajne bela, kaj en du flankoj ĉirkaŭas onin montoj. La loĝantaro de Islando jam de longe kutimiĝis al tio, ke ilia lando estas distirata, sed lastatempe oni konstata plialtigitan aktivecon en la regiono. Ĉiujare la nordamerika kaj la eŭrazia plategoj estas distirataj kelkajn centimetrojn, kio estigas riftojn, valojn, vulkanojn kaj gejserojn.



Ŝajnas, ke en tiu ĉi momento la islanda termaso estas distirata pli rapide. En aprilo estiĝis granda ŝiraĵo en la suda parto de Almannagja. La nova fendo estas 10 ĝis 14 metrojn profunda kaj troviĝas sur promenovojo, kiu nun estas fermita. Almannagja estas la plej orienta parto de la nordamerika platego. Hrafnagja male konsistigas la plej okcidentan punkton de la eŭrazia platego. *(Interreto).*

## 6. La papo eskapis al murdatenco (*De paus ontsnapte aan een moordaanslag*)

Papo Benedikto la XVI-a tute ĝuste eskapis al murdatenco. Tri tagojn antaŭ lia vizito al Torino la itala polico kaptis du marokajn studentojn, kiuj planis murdi lin.

Precize kiel ĉie en Eŭropo ankaŭ en Italio regas granda atentemo rilate al terorismo. Tute prave, kiel tio evidentiĝis. Post kiam la polico subaŭskultis dum multaj monatoj iliajn telefonadojn, ĝi arestis du marokajn studentojn, kiuj studas en la universitato de Perugia [pe'ruĝa], kaj pelis ilin el la lando.

Laŭ la itala antiterorisma polico la mezitala urbo Perugia jam delonge estas renkontejo de radikalaj islamanoj. Ankaŭ la turko Ali Agca, kiu atencis al la vivo de papo Johano-Paŭlo la II-a, kaj lia kompano siatempe estis registritaj kiel studentoj en la universitato de Perugia.

Jam dum kelka tempo la itala ministro de Internaj Aferoj gvatsekvigas islamajn studentojn kaj subaŭskultigas iliajn telefonadojn. Kiam la 26-jara Mohamed Hlal menciis, ke li intencas aĉeti eksplodaĵojn, la polico tuj reagis. Dum domtraserĉado ĉe Ahmed Errahmouni (22), studento kiu havis multan kontakton kun Mohamed Hlal, oni trovis mapon de Torino kun cirkloj kaj ciferoj. Ĉar oni atendis la 2-an de majo 2010 en Torino papon Benedikto, kiu volis preĝi en tiu ĉi urbo ĉe la mortotuko, kiun la katolika tradicio atribuas al Jesuo, la itala

registaro opiniis, ke la duopo planis murdatencon al la papo. Tial Hlal kaj Errahmouni estis tuj forigitaj el la lando. La konduto de ses aliaj eksterlandanoj, kiuj studas en Perugia, estas plu ekzamenata. *(El 'Dag Allemaal')*

## Novajoj el Esperantolando

*(Nieuws uit Esperantoland)*

**Svedio:** *Tutmondaj Esperantaj Piratoj* –

La Pirata Partio estas politika partio, kreita en Svedio, kiu kreskas tutmonde. La piratpartioj celas havi malfermitan informasocion, en kiu ne ekzistas limoj por la kreado, remiksado kaj distribuado de informoj, kiuj estas taŭgaj por la kreskado de scienco, kulturo kaj teknologio. Por la plej bona transdono de informoj ni bezonas ruzan lingvon, Esperanto.

Tamen la suba retejo servas unualoke al la internacia interŝanĝo de informoj inter ĉiuj landoj kun Piratpartio. Nun la plej bona loko por tio estas la retejo de **PP. International** (pirat-partio internacia) ĉe <http://www.pp-international.org>.

Ĉi tiu artikolo estas parta traduko de tiu paĝo, kiu ankaŭ servas por krei informojn specife por Esperantaj piratoj... Oni povas legi la tutan tekston ĉe <http://piratpartio.org>.

*(Ret-info, Eventoj, Hungario)*

**Ĉinio:** *Universitata kunlaborpeto el Ĉinio* –

Kara Sinjoro Pirlot, laŭ la bezonoj de nia Universitato ni volus komenci edukadan kunlaboradon kun tutmondaj universitatoj pere de Esperanto. Ĉu vi scias, kiuj universitatoj havas la saman deziron kunlabori pere de Esperanto aŭ per sia propra nacia lingvo?

Nun ekzistas kunlaboro kun kvar anglaj universitatoj, unu usona, du aŭstraliaj kaj unu

**BOUW  
EXPO  
TEGELEXPO  
MIX-BETON  
BOUWMATERIALEN**

DE LAAGSTE PRIJS DE HOOGSTE KWALITEIT,  
EN ONZE EXTRA SERVICE ZIJN ONZE KENMERKEN!

**PAESEN**

EEN ZAAK VAN VERTROUWEN !

TEGELEXPO 011 66 55 54  
BOUWEXPO 011 66 55 50



kanada, sed tiu kunlaborado okazas tute en la angla lingvo kaj ne en Esperanto. Sed mi opinias, ke ni povos havi novan kunlaboradon pere de la Lingvo Internacia. Bonvolu prezenti al ni kelkajn universitatojn por kunlabori sur la tereno de edukado. Ni preferus universitatojn en Anglio, Francio, Germanio, Belgio, Italio, Hispanio, Usono, Kanado, Aŭstralio, Brazilo, Meksikio, Rusio, Pollando kaj Aŭstrio.

Ni tuj kontaktos ilin, se ili havas la intencon kunlabori kun ni pere de Esperanto! Ni tutkore dankas ilin!

Bonvolu konatiĝi kun nia universitato pere de <http://www.bvtc.edu.cn/en/wsb/en/>. Temas pri la universitato de Guangdong Baiyun en la provinco Gŭangdong, kies ĉefurbo estas Kantono. (J.V. David tra Germain Pirlot)

**Francio:** *Amromano "Kabbala Esperanto" – "Kabbala Esperanto" estas la unua volumo de amromano de Olivia Cattan, prezidantino de nepartipolitika, civitana, multkultura, sekulara, feminista asocio "Paroles de femmes" (Vortoj de virinoj).*

Sur la paĝo "Pourquoi ce livre?" (Kial tiu ĉi libro?) de ĝia retejo Olivia Cattan klarigas sian malkovron de Esperanto: *"Mi malkovris la destinton de tiu lingvo, de tiu familio Zamenhof ekstermita pro la malamo de Hitler, de tiuj esperantistoj senditaj fare de Stalin al gulagoj. Mi eksciis ankaŭ, ke multaj kluboj ekzistas tra la mondo, kaj ke pli ol 10 milionoj da homoj parolas tiun pacolingvon. Mi, kiu partoprenis en multaj packonferencoj, diris al mi mem, ke tiu lingvo povus fariĝi la ŝlosilo de la interpopola frateco, kaj tial mi eklernis ĝin."*

Olivia Cattan verkis ankaŭ libron sub la titolo "La femme, la République et le bon Dieu – La place des femmes dans la société est-elle menacée par les religions?" (La virino, la Respubliko kaj la bona Dio – Ĉu la religioj minacas la lokon de la virinoj en la socio?) Batalo des pli malfacila, ĉar ambaŭflanke ekstremistoj strebas akriĝi la vundojn kaj krei pliajn.

(Henri Masson, Francio)

**Svedio:** *Jam 100.000 uzantoj de Lernu-net –*

Kun granda plezuro ni informas vin pri gravega mejloŝtono por *Lernu-net*: ĝi ricevis sian cent-milan registritan uzanton!

ESF dankas ĉiujn kunlaborantojn de *Lernu!*, kaj ankaŭ ĉiujn esperantistojn, kies malavaraj donacoj kontribuis al tiu ĉi sukceso. Fakte *Lernu-net* estas unu el la plej ambiciaj kaj sukcesaj projektoj sponsorataj de ESF, kaj tiu

jubileo estas grandega atingo ne nur por nia fondaĵo, sed ankaŭ por la tuta Esperanto-komunumo. ESF fieras, ke ĝia financa subteno ebligis la ekeston de tiu ĉi unika kaj plej vizitata Esperanto-retejo en trideko da lingvoj, kun ĉ. 100.000 paĝvizitoj ĉiutage, kun pli ol centoj da volontulaj lingvohelpantoj kaj tradukistoj, kaj nun kun komunumo de cent mil registritaj uzantoj el 240 landoj! Por festi tiun ĉi jubileon la *Lernu*-teamo okazigas konkurson por krei reklamilojn por la retejo (legu pli ĉe <http://lernu.net/konkurso>).

Sed ni tamen vidas ankoraŭ pli grandajn eblojn por evoluo kaj kreo de novaj Esperanto-projektoj, kaj krome estas necese subteni kaj pludisvolvi la jam ekzistantajn programojn. Ekzemple, edukado.net lanĉis antaŭ nelonge la "Retan Instruistan Trejnadon" (RITE, vidu [www.edukado.net/rite](http://www.edukado.net/rite)), kaj ni investis en la kreo de aŭtomata lingvokontrolilo por *Lernu!*, kiu devas ebligi nin doni pli rapidajn respondojn al la lernantoj kaj faciligi la laboron de la lingvohelpantoj. Tio estas nur unu el la multaj iniciatoj, kiuj meritas vian subtenon.

(*Esperantic.org*)

**Brazilo:** *Peticio favore al Esperanto –*

Ĝis la 31-a de majo oni kolektis en Brazilo jam 3734 subskribojn de personoj, kiuj deziras, ke la registaro metu la Internacian Lingvon Esperanto sur la programon de la duagrada lernejoj kaj tiamaniere do subtenas la leĝproponon celantan akceptigi Esperanton oficiale je la nivelo de la mezaj lernejoj.

Multaj aliaj iniciatoj aperas favore al Esperanto en Brazilo, lando leviĝanta sur la monda scenejo: apero de Esperanta traduko de verko de José de Paiva Netto, brazila ĵurnalisto, radiopreleganto kaj ĝenerala direktoro de la Legio de la Bona Volo okaze de la 8-a Tutamerika Kongreso de Esperanto en San-Paŭlo de la 9-a ĝis la 14-a de julio 2011; tŭiterkampanjo la 26-an de julio 2011; kreo de plurlingva retejo far juna esperantisto por disvastigi Esperanton sine de Rotary International, ktp. (Henri Masson, Francio)

**Rusio:** *La Ondo De Esperanto jubileis –*

La 6-an de junio 2011 en la Eŭropa Jura Universitato "Justeco" de Moskvo okazis kunveno okaze de la duobla jubileo de "La Ondo de Esperanto" – relanĉo de la fama magazino kaj apero de ĝia 200-a numero (junio 2011). En la programo troviĝis:  
- Enkonduko far prof. G.Ŝilo.

*Met de hartelijke groeten van  
Kun la koraj salutoj de*

## **KBC-Bank Hechtel**

Rode Kruisplein 5  
B-3940 Hechtel  
Tel. 011-73.02.20  
Fax 011-73.02.21  
[hechtel@kbc.be](mailto:hechtel@kbc.be)

- ‘De La Ondo ĝis La Ondo’, far A. Korĵenkov.
- ‘La jubilea Ondo’, far H. Gorecka.
- ‘Demandoj-respondoj, gratuloj kaj bondeziroj’, far S. Smetanina.
- Ĉampana regalo kaj babilado.

Dum la vespero oni povis rabatite aboni “La Ondon de Esperanto” por la tuta jaro 2011.

Al la membroj de la redakcio kaj subtenantoj de ‘La Ondo de Esperanto’ ni deziras ankoraŭ multajn jarojn da sukcesplena eldonado!

*(Ret-info, Eventoj, Hungario)*

### **Germanio: Inaŭguro de Arboesplora Pado –**

La tago de la inaŭguro de Arboesplora Pado sukcese pasis. La komuna projekto de la asocio Futurateliero Herzberg kaj NABU Germanio estis plena sukceso. Ĉeestis ankaŭ 14 esperantorilataj homoj. Dagmar Schwarzer estis la motoro de la komuna projekto.

Ĉirkaŭ la proksima lago Jues apud la urbeto Herzberg nun ekzistas unika promenvojo kun belaj arboj, kiuj havas nomŝildon en tri lingvoj: la germana, Esperanto kaj la scienc-latina. Jam 53 belaj, ofte raraj arboj havas tian nomŝildon. Ankaŭ tio unikas en la mondo.

Ĉu vi konas ekzemple la ilekson kaj la cugon kanadan? Venu al la Esperanto-urbo Herzberg, kaj vi povos konatiĝi kun multaj diversaj enlandaj kaj ekzotaj arboj kun esperantlingva priskribo. Tio estas nova grava mozaikŝtono por Esperanto. Pli da detaloj kun fotoj vi trovos sub la menuo “aktuale” ĉe:

<http://esperanto-urbo.de>.

*(Ret-info, Eventoj, Hungario)*

### **Danio: De Zamenhof ĝis la ĉielo –**

21 universitatoj kaj aliaj fakuloj proponis prelegon por la 64-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato, kiu okazos dum la 96-a

Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago de la 23-a ĝis la 30-a de julio 2011. Tio estas pli ol duoblo de la naŭ prelegoj, kiuj konsistigos la programon de IKU. La proponoj estis prijuĝitaj de la Komisiono de IKU surbaze de kies rekomendo la estraro de UEA faris la finan decidon. Jam pli frue la estraro elektis prof. C. Kiselman kiel rektoron de la 64-a IKU. La prelegotekstoj aperos en la t.n. IKU-libro, lanĉota dum la UK. Kelkaj antaŭaj volumoj ankoraŭ haveblas ĉe la Libroservo de UEA. Pluraj IKU-libroj estas konsulteblaj en la IKU-sekcio de la kongresreĵo. Resumoj de la Kopenhagaj prelegoj baldaŭ ankaŭ aperos ĉe: <http://www.uea.org/dokumentoj/IKU/index.html>.

*(Ret-info, Eventoj, Hungario)*

### **Nia rakonto: Modela milionulo (2) (*Ons verhaal: Een modelmiljonair*) (2)**

“Sed li aspektas belega en ili,” diris Trevor. “Mi ne volus pentri lin en redingoto por nenio en la mondo. Tio, kion vi nomas ĉifonoj, estas fantazio. Kio estas malriĉeco por vi, estas pitoreskeco por mi. Kiel ajn, mi parolos al li pri via oferto.”

“Alan,” Hughie diris serioze, “vi, pentristoj, estas senkorulaj.”

“La koro de artisto estas lia kapo,” respondis Trevor. “Kaj cetere, nia tasko estas prezenti la mondon kiel ni vidas ĝin, kaj ne reformi ĝin kiel ni konas ĝin. Al ĉiu sia metio. Kaj nun, rakontu al mi, kiel fartas Laura. La maljuna modelo multe interesiĝas pri ŝi.”

“Vi ne volas diri, ke vi parolis al li pri ŝi, ĉu?” demandis Hughie.

“Certe jes. Li scias ĉion pri la senkompata kolonelo, la aminda Laura, kaj la 10.000 punoj, kiujn vi bezonas.”

“Ĉu vi rakontis al tiu almozulo ĉiujn miajn privatajn aferojn?” ekkriis Hughie, ruĝiĝante kaj koleriĝante.

“Mia kara,” diris Trevor, ridetante, “tiu maljuna almozulo, kiel vi nomas lin, estas unu el la plej riĉaj homoj en Eŭropo. Li povus aĉeti morgaŭ la tutan Londonon sen elĉerpi sian konton. Li posedas domon en ĉiu ĉefurbo, tagmanĝas el oraj teleroj kaj povus preventi, ke Rusio militu, se li volus.”

“Kion en la mondo vi volas diri?” ekriis Hughie.

“Tion kion mi diris,” respondis Trevor. “La maljunulo kiun vi vidis hodiaŭ en mia studio, estas barono von Hausberg. Li estas bona amiko mia, aĉetas ĉiujn miajn pentraĵojn kaj



komisiis min antaŭ monato pentri lin kiel almozulon. Kion vi volas? La fantazio de milionulo! Kaj mi devas diri, ke li aspektis belega en siaj ĉifonoj, aŭ mi eble devus diri: en miaj ĉifonoj, ĉar estas malnova kostumo kiun mi aĉetis en Hispanio antaŭ longe.”

“Ĉu barono von Hausberg?” ekkriis Hughie. “Kara ĉielo! Kaj mi donis al li suveranon! Mi priridigis min!” Kaj tute konsternite, li sinkis sur fotelon.

“Ĉu suveranon?” ekkriis Trevor, ekridigante. “Mia kara, vi neniam revidos ĝin, ĉar lia ŝat-okupo estas la mono de aliaj.”

“Vi estus devinta rakonti tion al mi antaŭe, Alan,” diris Hughie paŭtante, “kaj ne lasi min priridigigi min.”

“Nu, Hughie,” diris Trevor, “antaŭ ĉio min neniam kaptis la ideo, ke vi cirkuladas distribuante almozojn en tiel senpripensa maniero. Mi povus kompreni, ke vi kisas belan modelinon, sed ke vi donas suveranon al malbela maljunulo, je Jupitero, tion mi ne komprenas! Cetere, hodiaŭ mi ne estis hejme por iu ajn. Kaj kiam vi envenis, mi ne sciis, ĉu von Hausberg ŝatas, ke mi menciu lian nomon. Vi scias, ke li ne surhavis siajn kutimajn vestaĵojn.”

“Li certe pensas, ke mi estas stultulo!” diris Hughie humile.

“Tute ne! Li estis ravita. Post kiam vi foriris, li daŭre rikanis kaj ridis, frotante siajn maljunulajn manojn. Mi ne povas kompreni, kial li tiel interesiĝas pri vi kaj volas scii ĉion pri vi. Sed nun ĉio estas klara por mi. Li certe investos vian suveranon por vi, Hughie, kaj pagos al vi la interezon ĉiun duonan jaron, kaj havos bonan historion rakontenda post la tagmanĝo.”

“Mi estas nur malbonŝanca diablo,” grumblis Hughie. “La plej bonan kion mi povas fari nun estas enlitiĝi. Kaj, kara Alan, rakontu tion al neni. Mi ne kuraĝus montri mian vizaĝon sur la stratoj.”

“Sensencaĵo! Tio honorus vin kaj vian filantropian spiriton, Hughie. Kaj ne foriru. Prenu plian cigaredon, kaj vi povas rakonti pri Laura tiom kiom vi volas.”

Sed Hughie ne volis aŭskulti la konsilojn, sed iris hejmen, forlasante Trevor laŭte ridantan kaj sentante sin tre malfeliĉa.

La sekvantan matenon, dum li matenmanĝis, lia servisto alportis al li karton, sur kiu estis skribita “Sinjoro Gustavo Naudin, nome de S-ro Barono von Hausberg”. “Mi supozas, ke li venis por senkulpigi sin,” diris Hughie al si mem, kaj li ordonis al la servisto enkonduki la viron. Maljuna sinjoro kun oraj okulvitroj kaj

grizaj haroj eniris la ĉambron kaj diris kun leĝera franca akĉento:

“Ĉu mi havas la honoron paroli al sinjoro Erskine?”

Hughie klinis sin.

“Mi venis laŭ komisiono de Barono von Hausberg,” li daŭrigis. “La Sinjoro Barono...”

“Mi petas vin prezenti al li miajn plej sincerajn ekskuzojn,” balbutis Hughie.

“La Sinjoro Barono,” diris la maljuna sinjoro ridetante, “komisiis min doni tiun ĉi leteron al vi,” kaj li etendis al Hughie sigelitan koverton. Sur ĝi estis skribita en elegantaj literoj:

“Geedziĝa donaco por sinjoro Hughie Erskine kaj fraŭlino Laura Merton, farita de maljuna almuzulo.” En ĝi troviĝis ĉeko por 10.000 pundoj.

Kiam ili geedziĝis, Trevor estis la honora fraŭlo, kaj la barono paroladis dum la geedziĝa festeno.

“Milionulaj modeloj,” rimarkis Alan ridante, “estas sufiĉe maloftaj, sed, je Jupitero, modelaj milionuloj estas ankoraŭ pli maloftaj!”

*(Oscar Wilde, trad. P.J.D.)*

## AKTIVAĴOJ DE LA LIMBURGA ESPERANTO-ASOCIO

### Ĵaŭdon, le 26-an de majo 2011:

Sep limburgaj esperantistoj kune vizitis en Peer la muzeon Brueghel, kiu estas instalita en malnova burĝodomo situanta apud la vendoplaco de Peer. Peer fiere nomas sin “la urbo de Brueghel”, ĉar la pentristo tre verŝajne naskiĝis en la nuntempa vilaĝo Grote Brogel, kiu estas parto de Peer. En la domo estas ekspoziciataj 43 fidelaj fotoreproduktaĵoj de pentraĵoj de Pieter Brueghel la Maljuna, faritaj en la sama formato kiel la originaloj. Inter ili estas tre grandaj pentraĵoj. Mankas en la muzeo ses pentraĵoj, kiuj troviĝas en eksterlandaj muzeoj.

La muzeo mem estas unikaĵo en la mondo.

La gvidistino, Marie-Josée Thijs, donis kompetentajn komentariojn pri la pentraĵoj, la arto kaj stilo de la granda pentristo, kiu preferis pentri ordinarajn homojn en ilia ĉiutaga vivo.

Vere valoris la penon viziti tiun muzeon.

### Ĵaŭdon, la 23-an de junio 2011:

Pro nentaŭvideblaj cirkonstancoj la planita globetludo (petanko) ĉe Jan Doumen bedaŭrinde ne povis okazi.